

LA PACDEFENDANTO

N-o. 57 NEREGULA INFORMA CIRKULERO POR ĈEĤOSLOVAKIO Oktobro 1956.

TUTŜTATA ESPERANTISTAKONFERENCO

LA 20-21. DE OKTOBRO 1956 EN OLOMOUC

TKKE, kiel preparkomitato por fondi Ĉeĥoslovakian Esperanto Union, anoncas jenan raporton:

Surbaze de persona traktado de komitatanoj de TKKE, k-doj M. RUDOLF, Jos. VÍTEK kaj d-ro. Jar. JERMÁŘ la Centra Komitato de la Kom-partio komisiis la ministerion por kulturo, ke tiu en kunlaboro kun la TKKE rapidigite preparu ĉion necesan por kreo de tutŝtata esperantista organizaĵo. Sekve de tio okazigis la 21. kaj 22. de julio en Doksy konsila kunveno de la Tutŝtata Konsulta Komitato de Esperantistoj /TKKE/. Antaŭ la programo estis prezentita raporto pri la sukcesplena kongreso de bulgaraj esperantistoj, kiun ĉeestis reprez. de ministerio por instruado, verkisto Karaslavov, reprezentantoj de bulgara publika vivo kaj kulturo kaj esp-delegitoj el popoldemokrataj landoj. Detalajn informojn alportos la "BULTENO" de la Esperantoklubo en Praha.

Sekvis raporto pri la rezultoj de la ĝisnuna agado de TKKE kaj preparo de Tutŝtata Esperanto Konferenco por fondi landan Esperanto-organizon. Laŭ decido, tiu konferenco okazigos la 20. - 21. de oktobro 1956 en Olomouc. K-do d-ro Pumpr prezentis al la komitatanoj proponon de asociaj statutoj kun kies regularo escepte de malgrandaj ŝanĝoj, kompletigoj, ĉiuj anoj konsentis. Post ties prezento al la tutŝtata konferenco ilin devos ankoraŭ aprobi la koncernaj oficialaj instancoj.

Laŭ decido de la kunveno TKKE invitas al la konferenco la ĝen. sekr. de MEM, k-don Ant. Balague, la ĝen. sekr. de UEA, k-don Ivo Lapenna, la sekr. de la Lingvosciencia Instituto en Moskvo, k-don. E. A. Bokarev, kaj reprezentantojn de la Esp-movadoj en Sovjet-Unio, Hungario, Polio, Bulgario, Rumanio, Jugoslavio, Aŭstrio, Ĉinio kaj Vietnamo, kiuj jam promesis sian partoprenon. Krom tiuj estas invititaj multaj eminentaj esp-istoj kaj aktivuloj el aliaj landoj. (La of. invitiloj jam estis senditaj tuj post la kunsido/.

Antaŭ la ofic. konferenco kunvenos la slovakaj esperantistoj por diskuti siajn proprajn problemojn, kiujn ili poste prezentos al la konferenco.

TKKE proponas al la konferenco en Olomouc jenajn kandidatojn por la funkcioj en la Centra Komitato de la fondota asocio:

Prezidanto: Josef Víték /Praha/, Ĝen. sekretario: M. Rudolf /Olomouc/, membroj de la Centra Komitato kaj ties anstataŭantoj: Bartovská /Místek/, Burda /Plzeň/, Cink /Albrechtice/, Evjáčková /Otrokovice/, d-ro Izák /Martin/, d-ro Jermář /Praha/, kanoniko A. Macek /Mikulov/, Kilián /Třebíč/, Kořínek /Brno/ Kožený /Kutná H./, Lička /Ostrava/, Matušová /Otrokovice/, d-ro Mohapl /Olomouc/, Novobilský /Praha/, Slanina /Praha/, Slaný /Ostrava/, Špúr /Doksy/, Vondroušek /Brno/ kaj Werner /Brno/.

Por la kontrolkomisiono: Barochová /Praha/, Hašlar /Doksy/, Janda /Kolín/, Pytloun /Liberec/, Václavek /Praha/, Všolek /Olomouc/.

Pagitaj asociaj oficistoj: Jar. Šustr kaj J. Mařík el Praha.

Kiel prezidantoj por la konferenco estas proponitaj:

Prof. Jos. Kožený el Kutná Hora kaj Eduard Tvarožek el Martin, Slovakio

Eventualajn ŝanĝojn aŭ kompletigajn proponojn necesas ĝustatempe sendi al: K-do. Miloš RUDOLF, Wanklova č. 14, OLOMOUC, Ĉeĥoslovakio.

Al la citita adreso bonvolu sendi ankaŭ salutleterojn kaj telegramojn por la konferenco.

La prezidanto de MEM, k-do Burda proklamis en la nono de ĉeĥoslov. MEM-anoj, ke tiuj kunlaboros sur la komuna fundamento de la nova asocio kaj la ĝis nun multobligita organo "LA PACDEFENDANTO" ĉesos plu aperi kiam eldoniĝos komuna Esperanto-gazeto por Ĉeĥoslovakio.

K-dinoj Evjáková kaj Matušová el Otrokovice anoncis, ke ili pretigos transparentojn por ornami la statojn de Olomouc okaze de la konferenco kaj invitas gek-dojn el aliaj lokoj, sekvi ilian ekzemplon.

Presservo de TKKE

RAPORTOJ DE LA PREPARA KOMITATO

Fondiĝis speciala preparokomitato por organizaj aferoj de la Tutŝtata Esperanto Konferenco. Ĝia adreso estas:

K-do. J. Karhan, Na Hradě 2, OLOMOUC.

Konferenckotizo, inkluzive enirbileto por la Arta Vespero, okaziĝinta sabate la 20. de okt. kostas 13. - Kĉs.

En la kadro de la konferenco okaziĝos impona propaganda ekspozicio. Ĉiuj gek-doĵ estas petataj sendi aŭ pruntedoni por ĝi interesan materialon.

Okaze de la konferenco estis eldonita bele presita afiŝo en Esperanto kaj ĉeĥa lingvo. Glumarkoj laŭ projekto de k-do. D. Bartošik estas en preparo.

La rondeto de Olomouc proponis por la Centra Komitato akcepti ankaŭ k-don Miloš HRUŠKA el Znojmo, kiu meritas fondiĝon de Esp-rondeto en Znojmo, kiu atingis post aranĝo de 2 kursoj 80 membrojn.

La konferencpartoprenantoj povas mendi tranoktejon aŭ en hotelo, aŭ en komunaj loĝejoj.

Se vi deziras ricevi fervojrabaton, tiam necesas, ke vi tuj aliĝu. Sa vi postulas respondon je viaj informpetoj, necesas aldoni afrankitan letoron /tio ne rilatas eksterlandon/.

POR LA UNUECO DE LA ESPERANTO-MOVADO EN ĈSR

TKKE havas jam oficialan antaŭpromeson, ke la respektivaj ŝtataj instancoj aprobos la fondiĝon de tutŝtata Esp-organizo kaj donos permeson por eldonado de presita, belaspekta Esperanto-gazeto. Krom ĝi eldoniĝos tre verŝajne multobligitaj informiloj, unu en ĉeĥa lingvo, la dua en slovaka, kiuj raportos al la membraro pri organizaj aferoj kaj servos por enlanda propagando de nia lingvo. Ankaŭ ili eble enhavos Esp-tekstojn.

La nova asocio ne havos ofic. grupojn en ĉiuj lokoj de nia lando, sed konsistos nur el individuaj membroj-abonantoj, kiuj havos la eblecon en lokoj kie ili estos pli multoj, krei rondetojn en la kadro de uzinaj kluboj, kulturdomoj, packomitatoj ktp. De tiuj organizoj la rondetoj ĝuos ankaŭ financan kaj moralan subtenon, kiam ili al ties interesoj per Esperanto kontribuos. La ideologiajn direktivojn donos la centra Esp-asocio. La asocio havos siajn regionajn reprezentantojn, kiuj pere de pluaj kunlaborantoj en konsento de la centra komitato povas kunvoki regionajn konferencojn por pritrakti aktualajn problemojn. Landaj kongresoj okaziĝos ĉiujare en alia urbo. Pri la plej proksima, en 1957, decidis la konferenco en Olomouc. Bonvolu sendi skribajn invitojn. La asocio ankaŭ eldonados presitan Esp-literaturon, lernolibrojn, vortarojn k. a. En la kadro de la asocio funkcios kiel memstaraj sekcioj, junularo, pacdefendantoj, instruistoj k. a. Tiuj havos siajn proprajn estrarojn kaj laboros en la senco de la asociaj statutoj kaj ties regularo en densa kontakto kun la centra komitato. Ĉiu gvidanto de sekcio estos samtempe membro de la centra komitato.

Post 5 jaroj fine la ĉeĥoslov. esperantistoj atingis sian celon.

Oficialaj instancoj ne plu rigardas nin kiel kosmopolitojn, sed rekonas, ke nia agado estas utila por la homa socio. Tial necesas rapide kunvoki landan konferencojn por fondi tutŝtatan Esperanto-organizon. Kompreneble ni, esp-pacdefendantoj en tiu ĉi favora situacio, kiu ja grandparte estas la rezulto de nia agado, ne povas plu stari ĉi tie kiel aparta movado kvazaŭ ĉi venko ne koncernus nin.

Tial mi proklamis en la kunsido de TKKE en Doksy, kiun mi partoprenis kiel reprezentanto de la esp-pacdefendantoj kune kun aliaj niaj funkciuloj, ke ni formos sekcion de esp-pacdefendantoj en la kadro de la nove fondota asocio tutŝtata. Estas necese havi unuecan, koncentrigitan Esperanto-movadon en nia lando, ĉar nur per unuigitaj fortoj ni kapablos manifesti la altan signifon de Esperanto por la homaro.

Konsekvence de tio ankaŭ ĉesos aperi "LA PACEFENDANTO" tuj post kiam eldoniĝos la centra organo de la asocio, kiu estos presita kaj belaspekta. (Verŝajne ek de 1957.) Rekompenca, laŭ mia propono, ties redakcio donos 1-2paĝan rubrikon (laŭ kiel decidis la konferenco en Olomouc) por raportoj pri la pacmovado. La redakcian komitaton aprobos la konferenco.

La asocio ankaŭ transprenos la eldonadon de "PACO" kiam vicis eldoni ĝin en Ĉeĥoslovakio kaj distribuos ĝin al la ĉeĥoslovakaj abonantoj. La redakcian rondon por la "PACO" kompreneble rajtas elekti la anoj de la sekcio de esp-pacdefendantoj en konsento kaj aprobo de la MEM-estraro.

Ankaŭ la ceterajn eksterland. Esp-gazetojn, kiujn ĝis nun nia administracio distribuadis, prizorgos la asocio kaj rekompenkos ilin anstataŭ por L. P. per la sama kvanto de la presita centra ĉsl. organo.

Post kiam la apero de la centra organo estos certigita, tiam ni tuj transdonos ĉiujn abonantojn de "LA PACDEFENDANTO" al la nova administracio en Praha, de kiu ili en daŭrigo ricevados la centran organon kun rubriko pri la pacmovado anstataŭ L. P-on. La prezo de la nova organo ankoraŭ ne estas fiksita. Ĝi dependos de ĝia amplekso kaj kvalito kaj kompreneble ankaŭ de la eldonkvanto. Ĝia titolo ankoraŭ ne estas decidita kaj tre verŝajne pri tio diskutos la konferenco en Olomouc.

Eble ĉi decidoj ŝajnis al kelkaj niaj anoj partan likvidon de nia ĝis nun sukcesplena esp-pacmovado /escepte la financa situacio/. Sed tio estus erara opinio. Male, nia movado el tiuj decidoj profitos, ke kelkaj aktivaj niaj funkciuloj de la ĝisnuna laboro liberiĝos ĉar ĝin transprenos la pagitaj funkciuloj de la asocio, kaj ili povos dediĉi sian energion kaj tempon al pli gravaj aferoj. La pagitaj funkciuloj ankaŭ donos pli grandan garantion, ke ili bone plenumos ĉiujn taskojn, dume tion ne eblis postuli de gek-doĵ, kiuj faris tiun laboron nur dum sia libera tempo, post la ĉiutaga laboro kaj senpage.

Necesas ĉi okaze ankaŭ konstati ke, malgraŭ oftaj malfacilaĵoj niaj ĝisnunaj funkciuloj kuraĝe kaj honeste plenumis siajn taskojn. Ili gvidis la esp-istojn kaj laboris entuziasme kaj kuraĝe dum tutaj 5 jaroj de malluma tempo, kiam Esp-o de oficialaj instancoj jam estis kondamnita al likvido kaj morto. Ili ne nur kolektis kaj kuraĝigis la esperantistojn de Ĉeĥoslovakio al aktiva laboro per Esperanto por la mondpaco, sed ili ankaŭ trabatalis la vojon kaj donis ekzemplon al la ceteraj popoldemokratiaj esperantistoj kaj Sovjet-Unio, el kia fina grandparte rezultigis la oficiala aprobo de leĝe organizita Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio mem. Tial ne estas kaŭzo por timi, ke ni, esp-pacdefendantoj envicigonte nin en la landan asocion perdiĝos inter la ceteraj esperantistoj. Pro tio ni ĉiuj komune kunvenos la 20-21. de oktobro kun fiera konscio en la Tutŝtata Esperanto-Konferenco de Olomouc por etendi niajn manojn al la ceteraj ĉeĥosl. geesperantistoj, kiuj same kiel ni ankaŭ volas batali per Esperanto por la mondpaco.

Rudolf BURDA, prezid. de NEM.

GRANDIOZA MONDKONGRESO EN KOPENHAGO

Oni povas diri, ke la 41a Universala Esperanto Kongreso en Kopenhago denove post 8 jaroj estis vere universala ĉar pluraj orientlandanoj denove estis partoprenintaj apud la gesamideanoj el okcidento, sudo kaj nordo.

Pli ol 2.200 esperantistoj el 46 landoj, i.a. 3 el Ĉinio, 2 el Polio, 4 el Bulgario, 6 el Germanio-D.D.R., 1 el Vietnamo kaj 6 Hungaroj. Inter la 6 Hungaroj ni havis la grandan plezuron vidi kaj aŭskulti la faman poeton Julio Baghy.

Dum la unua ĝenerala kunveno de UEA, kiam Baghy prezentis sin sur la tribuno, la publiko en plenplena salono tondre aplaŭdegis. En la sama kunveno parolis Esp-lingve ofic. reprezentanto de hungara kulturministerio kaj s-ano Dratwer informis la publikon pri la tre vigla agado por Esperanto en Polio. Samtempe li montris grandformatan belaspektan revuon "Pollando" kiun eldonis Polio en ses lingvoj kaj ankaŭ en Esperanto. La unua n-ro enhavas artikolon pri Esperanto, kiu estas publikigita samtempe ankaŭ en la 6 alilingvaj eldonoj.

Dum ambaŭ kunvenoj de UEA estis laŭtlegitaj salutleteroj kaj telegramoj el diversaj partoj da la mondo, i.a. pluraj el Sovjetunio. Per telegramo ni aŭdis la unuan postmilitan vivsignon de la konata lingvoinstruisto Seppik el Tallin. Seppik i.a. telegramis al la kongreso: "Neniam en Estonio la intereso por Esperanto estis tiel grandega kiel nun". Pro div. kaŭzoj neniu sovjeta s-ano povis partopreni, kvankam du esperantistaj eminentuloj aliĝis. Pro tio ankaŭ ne povis okazi unu prelego.

Cetere la programo de la tuta semajno estis tre varia. Okazis 10 prelegoj pri diversaj sciencaj temoj. Preligis universitataj eminentuloj. Unu vespere al la tuta kongresanaro teatroamatoroj de Kopenhago prezentis 3 danajn teatraĵojn en brila maniero, kvankam ili estis studentaj Esperanton nur dum ses monatoj. Ankaŭ la unua infan-kongreseto de UEA brile sukcesis.

La dana gazetaro multon skribis pri la kongreso, grandspace kaj tre favore. Dum la tuta semajno en la plej granda gazeto de Danio aperis Esp-lingva kolono kun novaĵoj kaj plej gravaj okazintaĵoj. Ekskursoj al diversaj regionoj de Danlando restas belaj memoraĵoj. Pligrandskale ol iam estis dum tiu ĉi kongreso tre laborriĉa programo por la diversaj faksekcioj. La unuan fojon en la kadro de UEA kongreso kunvenis pacdefendantoj de MEM. La esp-junularo akceptis gravan rezolucion, rilate pli aktivan laboron por disvastigi Esp-on inter gejunuloj. Fondiĝis aparta sekcio de junularo ĉe UEA. Inter la kulturaj progranoj necesas mencii la hungaran matineon, dum kiu estis prezentitaj du filmoj pri Hungario kun esp-tekstoj kaj paroladaj. Plue, deklamado de J. Baghy pri la hungara popolo ĉe Danubo, kaj la postmilita kultura evoluo en Hungario. Tre koncize raportis Lajos Márton pri la tiea favora stato de la Esp-movado. Laŭ liaj informoj Hungaria intencas en 1957 eldoni poŝtmarkojn pri Zamenhof kaj Esperanto. Kun gaje li komunikis, ke U.E.A. akceptis unuanime la Hungaran Esp-Komitaton kiel Membro-asocion. Krom tio estas dum la kongreso en Kopenhago enpagitaj kotizoj por 500 asociaj membroj de UEA kaj por 50 membroabonantoj.

Certe vin ankaŭ interesas, ke dum unu el la UEA-kunvenoj la kongresanoj eksciis, ke samideano Dratwer ricevis oran ordenon de la pola ŝtato pro meritoj por Esperanto-laboro en Polio.

Tiu kongreso atingis rekordan ciferon rilate nombron de partoprenintaj landoj, kvakam tiel grava Esp-lando kiel Ĉeĥoslovakio ne estis reprezentita.

BERTIT Englund, Bofors.

ESTONIA

RADIO KAJ GAZETOJ PRI ESPERANTO

Nun mi ĝuas unumonatan libertempon, kaj ĝin mi uzas maksimume por Esperanto. Esperanto en Estonio vere progresas. Ĉiutage ni aŭdas pli kaj pli da voĉoj pri kaj por Esperanto. Niaj gazetoj centraj kaj lokaj ofte publikigas esp-artikolojn kaj novaĵojn. Oni favore rilatas al Esperanto. Ankaŭ Radio-Tallin ofte alportas tiurilatajn raportojn.

Antaŭ unu nionato mi estis en Tallin kaj vizitis ĉe la centra komitato de la kom-partio gvidanton de propaganda fako. Li laŭ nomo jam konis min. Proksimume unu horon ni parolis pri Esperanto, pri malnovaj s-anoj komunistoj, pri perspektivoj de la Esp-movado kaj agadplano. Li favore rilatis kaj akceptis proponojn, kaj rekomendis al mi, kiam mi revenos hejmen, tuj aranĝi kursojn ktp. Li persone ne konis multajn komunistojn parolantajn Esperanton, kiuj laboras en Tallin kaj havas tie gravajn postenojn. Notinte ties nomojn, li verŝajne jam kun ili kontaktis.

Esperanto-gazetojn ni ricevas konstante rekte kaj pere de k-do B. Toll el Leningrado. Dankon al vi, ĉar L. P. atingas min regule kaj mi ĉiam ĝin tuj distribuas.

Hodiaŭ mi ricevis la polan BULTENON n-o. 5 de majo 1956. Ĝi raportas pri Esperanto-novaĵoj en Sovjet-Unio kaj Estonio. Hodiaŭ la situacia jam multe ŝanĝiĝis, multe pli favore al nia movado.

Niaj artikoloj jam aperas en multaj regionaj gazetoj, kion oni longe antaŭe ne faris, ĉar ili

atendis, kion faros la centraj gazetoj.

Skribante ĉi leteron, vespere je la 21a horo, mi samtempe aŭskultas radioelsendojn. Ĵus Tallin donas tagnovaĵojn. Jen aŭskultu, oni parolas pri Esperanto:

"Lastatempe kreskas la intereso pri la internacia lingvo Esperanto. Tial la Estonia Radio sin turnis por ricevi informojn pri la Esperanto-movado kaj lerneblecoj al la sekretariino de la Esperanto-sekcio en Tallin, k-ino Hilda Drezen, kiu respondis, ke la intereso inter laboruloj, lerni Esperanton, estas granda. Ĉiu lunde kunvenas en Tallin ĉ. 200 esperantistoj. Pli ol 100 homoj registriĝis por lerni Esperanton, inter ili kelkaj deziras ĝin lerni skribe. En urbo Tartu profesoro lingvisto Ariste instruas Esp-on en ŝtata universitato, en Viljandi muzikinstruisto Pung gvidas Esp-kurson kaj preparas eldonon de nova esp-lernolibro. En multaj aliaj lokoj oni komencis lernadon de Esperanto. Por tiu celo estas aranĝataj studrondoj kaj kursoj."

Tiujn vortojn disaŭdigis la 31. de julio la estonia radiostacio en Tallin.

La 26. de julio mi estis en Riga kaj vizitis s-anojn Arbergs, Otilio kaj Arvedo Vëtra kaj Kaunvalkas. Mozerts ne estis hejme. Konatiĝo kun tiuj amindaj homoj kiel patrino kaj filo Vëtra kaj simpatia k-do. Arbergs restas neforgesebla. Ĉe ili mi legis multajn Esperanto -leterojn, rigardis esp. librojn, gazetojn kaj fotojn. Nun mi konas ankaŭ vin, la redaktonon de L. P. laŭ foto, kiun havis Vëtra. Renkontiĝoj kaj reciproka interŝango de spertoj tre utilas al nia laboro.

Arne MUNAK
KILINGI-NOMME, Estonio.

AL LA ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTISTARO

Kar aj amikoj!

Akceptu multajn salutojn de la 12a mondkunveno de junaj Esperantistoj, kiu okazas la 28an de jul. ĝis 4an de aŭg. 1956 ĉi tie en la bela banloko nordmara Büsum. Ĉi tie nuntempe kunestas 300 gejunuloj el diversaj landoj. Ili parolas nur unu lingvon, Esperanton, kaj komprenas unu la alian bonege. Nia saluto instigu vin, por ke ankaŭ ĉe vi la Esperanto-movado pli fortiĝu !

Supra salutletero atingis nian redakcion jam antaŭ semajnoj. Ĝin subskribis reprezentantoj el jenaj landoj: Okc. Germanio, DDR, Sarlando, Aŭstrio, Danlando, Francio, Nederlando, Svedio, Britio, Finnlando, Italio, Norvegio, Svisio, Maroko, Jugoslavio, Grekio kaj Egiptio. Iliajn subskribojn ni ne povas represi, ĉar la plejmultaj estas nedeĉifreblaj. Raporto de TEJO.

KONFERENCO DE ESP-JUNULARO EN ĈEĤOSLOVAKIO.

okaziĝis la 28. de julio en la kastelo de la Regiona kulturcentro de Hradec u Opavy. Partoprenis 86 personoj el 34 lokoj de Ĉeĥoslovakio kaj eksterlandaj gastoj. Inter ili: Imre Ferenczy, junulara sekretario de la hungara Esp-konsilantaro, juna instruisto el Nederlando, Henk Saalting kaj ing. Gustav Nilsson el Svedio. Salut-leteroj venis i.a. de k-do. Hujucz parlamentano de Ĉina Popola Respubliko. La junularo pritraktis aktualajn problemojn kaj konstatis plenumon de ne malgravaj taskoj. Junularaj Interes-rondetoj nun ekzistas en pli ol 20 lokoj de Ĉ.S.R. La kunveno esprimis deziron, ke la Esp-junularo havu siajn respektivajn reprezentantojn en la centra komitato de la fondota landa asocio.

Akceptita rezolucio esprimis la volon de la junularo, labori per Esperanto por internacia komprenigo kaj la mondpaco, kaj intensigi siajn klopodojn por disvastigi Esperanton ĉefe inter junaj homoj.

Jaroslav MAŘIK
PRAHA

AL LA TUTŜTATA JUNULAR-KUNVENO EN Ĉ.S.R.

Dank' al Esperanto mi havas la feliĉon kaj honoron kontakti kun vi, ĉeĥoslovaka esperantista junularo.

Malgraŭ larĝa distanco inter niaj du patrujoj, la popoloj de Ĉeĥoslovakio kaj Ĉinio estas tre intimaj amikoj kaj fratoj. Ni kune laboras kaj batalas por konstrui socialismon en niaj propraj landoj

kaj gardi la pacon en la mondo. Dum la pasintaj jaroj jam tre ofte ĉeĥoslovakaj gejunuloj vizitis nian landon kaj reciproke ĉinaj la vian. Nur diferenco de nacilingvo malhelpas la kunlaboron kaj kunligiĝon inter ni. Ĉu ne? Estas tre bone, ke ni, la ĉeĥoslovakaj kaj ĉinaj gejunuloj lernas kaj uzas Esperanton la internacian lingvon. Mi kredas, ke pere de Esperanto la amikeca kaj kultura kontakto inter la ĉina kaj ĉeĥoslovaka junularo pli multe kaj pli rapide progresos.

En la nomo de la ĉina esperantistaro kaj ankaŭ en la nomo de la ĉina junularo mi sendas al via jarkunveno tutkoran kaj fratan saluton kaj deziras al vi, ĉiuj gesamideanoj, bonan sanon kaj sukceson en laborado kaj lernado. Vivu la ĉeĥoslov. junularo!

Vivu amikeco inter la ĉina kaj ĉeĥoslovaka popoloj! Vivu socialismo kaj la paco!

Hu Yu Zhi
parlamentano en Peking.

"SZABAD NÉP"

Unu el la plej disvastigitaj hungaraj ĵurnaloj tre ofte raportas pri la Esperanto-movado. En la eldono de 21. julio, kiun al ni afable sendis hunara kdo, ni legas sur la titolpaĝo ampleksan raporton pri la 41a kongreso de UEA en Kopenhago kaj pri la Esp-movado, en la Popol-demokratioj kaj Sovjet-Unio. Krom tiu ĉi grava partia gazeto ankaŭ aliaj hungaraj gazetoj jam favoras publikigon de per-kaj por-esperantaj artikoloj.

LA HUNGARA ESP-MOVADO OFIC. PERMESITA.

Ĉe ni unu sukceso sekvas la alian. Ĵus mi ricevis de k-do. Márton Lajos ofic. dekretan de popolkleriga ministerio, en kiu la Hungara Esp-Konsilantaro estas aprobita kaj inter alie, ĝi rajtas eldoni propran Esper. gazeton ktp. Kursojn eblas plenrajte aranĝi en kulturdomoj. Ĝis nun ili nur silente estis toleritaj, sed nun, dank' al la senlaca klopodado de hungaraj ge-kdoj eĉ ofic. paperon ni ricevos por ĝi.

Nature, la kerno de ĉiuj sukcesoj devas esti serĉata en Ĉeĥoslovakio, kie vi kaj viaj bravuloj - sen timo de persekuto en la plej malhelaj tagoj de la abomeninda stalinismo - daŭrigis la rompitan laboron kun entuziasmo kaj konscio, neŝanceligeble kredante en la justeco de viaj iniciatoj! Kiel ajn okazu en la estonto, via nomo kaj tiuj de viaj bravaj kunlaborantoj restos eterne brilantaj antaŭ ĉiuj konsciaj esperantistoj, ĉie en la mondo!

Por septembro mi organizas Esp-kurson por pedagogoj kaj krom tio mi preparas interŝtatan E-kurson (Aŭstrio-Jugoslavio-Hungario) por gimnazianoj.

La 7/9. Radio Zagreb elsendas programon pri la 2a hungara Esp-Renkontiĝo en Budapeŝt, pri kiu mi sendis detalan raporton al ĝi. Pri tiu grava okazintaĵo mi same sendis raportojn al la gazetoj: Szabad Nép, Szabad If juság, Vasmege kaj al 8 provincaj urboj. Vasmege hodiaŭ publikigis artikolon pri la novaperinta revuo "Pollando", tre favoran.

D-ro Jos. KONDOR
VASVÁR – Hungario

HUNGARAJ ESPERANTISTOJ EN KOPENHAGO

Sub tiu ĉi titolo aperigis la konata hungara taggazeto SZABAD NÉP jenan vere interesan raporton (Szabad Nép = Libera Popolo)

"Mi havis la feliĉon, ke mi povis partopreni kun 4 aliaj kolegoj la Universalan Esperanto Kongreson en la dana ĉefurbo, Kopenhago. 2.200 delegitoj el 44 landoj ĉi tie kunvenis por diskuti problemojn de la hodiaŭ jam sufiĉe disvastigita movado.

Al la ĉi jara kongreso de la Universala Esperanto Asocio (UEA) specialan signifon donis la cirkonstanco, ke post longaj jaroj ankaŭ ĝin partoprenis delegitoj el Popoldemokratioj. Kun granda ĝojo oni bonvenigis Ĉinojn, kiuj akcentis, ke en ilia patrio oni atribuas seriozan signifon al Esperanto, kiun eĉ Ĉinoj facile kapablas lerni. Same kiel la hungaraj, francaj, danaj, jugoslavaj kaj alinaciaj parolintoj, ankaŭ ili plenforte aprobis Esperanton kiel ilon por plifacila reciproka interkonatiĝo, por paco kaj amikeco inter la popoloj. Vere, ne ĉiutaga sento estis sidi en la grandega

ĉambro de prelegoj kaj sen interpretisto, sen kapaŭskultilo tuj ekkompreni kaj atente sekvi paroladojn de kvin kontinentoj. Evidentiĝis, ke la Esp-movado evoluigis tre kontentige; ne estas lando en la mondo kaj eble eĉ ne urbo, kie ne troviĝus delegito por la propagando de Esperanto.

Kun ĝojo mi povas raporti, ke la 5membra hung. delegitaro akiris multajn amikojn por nia patrio. Tion ni povas danki parte ankaŭ al tio, ke venis kun ni kiel delegito Julio Baghy, esp-poeto kaj verkisto, kiun la esperantistoj ĉie en la mondo konas kaj estimas. Nur unu karakteriza epizodo: Ni atingis la kongreson kun dutaga malfruiĝo, la konsultadoj jam vigle progresis. Kiam ni enpaŝis la ĉambregon kaj oni eksciis, ke ni estas Hungaroj kaj inter ni s-ano Baghy, en la kongresejo eksplodis grandioza ovacio, kiu daŭris minutojn. La ĝojkrioj nur tiam ĉesis, kiam Julio Baghy iris sur la scenejon por danki per kelkaj rapidfaritaj salutvortoj la varman akcepton.

Grandan sukceson havis interalie la de ni kunportita kolora filmo "Ni bezonas pacon". Ĝi parolis esperante. Sekve de nia prezento eĉ naskiĝis decido, ke venontjare en Marseilles oni aranĝos filmfestivalon de esp-istoj, ĉe kiu nature jam la hungaraj filmoj renkontiĝos kun rivaloj. Tre multaj vizitis la prezentadon pri la evoluo kaj kulturo de nia patrio. Akcepto de diversnaciaj reprezentantoj en la hungara ambasadorejo de Kopenhago havis bonan eĥon en la dana gazetaro.

Kiel interesaĵon mi mencias, ke, kiam amerika esp-isto en sia parolado protestis kontraŭ la "komunista influo" je la movado, la kongreso repuŝis la tutan akuzadon unuanime per tio, ke ĝi ne permesas uzi la neŭtralan lingvon Esperanto aliel, ol nur por la plifortigo de la amikeco kaj interfratiĝo de popoloj.

Post unusemajna konsultado ni malfacile adiaŭis de niaj danaj kaj alinaciaj esp-istaj geamikoj. Sennombrajn invitojn ni ricevis de ili - min ekz. oni invitis al Svedio, Nederlando, Francio kaj Italio. Niajn novajn amikojn ankaŭ ni kun ĝojo invitis al nia patrio kaj ni esperas, ke venontjare, kiam ni aranĝos nian Landan Esperanto Kongreson, multajn eksterlandajn gesamideanojn ni povos revidi.

Domokos Lajos
repres. de la hung. popolkleriga
ministerio.

La tradukon prizorgis: Dr. J. KONDOR

ĈINIO VEKIĜAS

Dum kelkaj jaroj de severa stalinismo, kiu ne nur influis la eŭropajn Popoldemokratiojn, sed sin etendis ĝis la malproksima Ĉinio, la Esperanto-movado kvankam ĝi estis bonege servinta al sia patrio kaj la mondopaco, tie tombe silentis. Unu k-do – iam informis nin eĉ pri loĝeja vizito kaj traserĉado, pere de policio, kaj se eble similaj intervenoj okazis divers-loke, ne estas mirinda, ke ĝi fortimigis multajn aktivajn ĉinajn esperantistojn. Post la reekfloro de nia movado en ĉiuj Popoldemokratioj kaj Sovjet-Unio fine ankaŭ Ĉinio vekigis. Pri tio atestas jena letero, kiun ĵus antaŭ la redakcia fino ni ricevis:

ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, PEKING.

20. aŭgusto 1956.

Estimataj gesanideanoj!

Ni ĝojas vin informi, ke nia movado revigliĝos baldaŭ en nia lando kaj nia laboro bezonas multajn materialojn esperantajn kaj priesperantajn. Tial ni petas vin sendi al ni ĉiujn esperantaĵojn de vi eldonitajn (ĉi kune devas vin danki por viaj sendaĵoj en la lastaj jaroj) kaj informu nin pri ĉiuj gravaj okazintaĵoj rilate Esperanton en via lando.

Kompreneble, nun ankoraŭ ni ne povas rekompenci vin per propraj eldonaĵoj, nek per mono, sed ni povos tion fari estonte.

Antaŭe dankas por via valora helpo kaj sincere vin salutas

s-ane via Hujuz
ĈINA ESPERANTO-LIGO

La gravecon de tiu alvoko certe ĉiuj niaj legantoj komprenas. Red.

ŜIRMADO KONTRAŬ ATOM-ARMILOJ

Jen ni publikigas respondon, kiu venis rekte el Japanio al la artikolo publikigita siatempe en "PACO" de d-ro. V. Řepka el Plzeň:

"En la ĉeĥoslovaka eldono de PACO, n-o. 29-30 mi legis artikolon sub titolo "Ŝirmado kontraŭ atonarmiloj", kiu estis precipe interesa por mi. Min ĝojas, ke la artikolo aperis en PACO k vekis atenton de multaj pacamikoj pri la atombombo. Sed bedaŭrinde kun ĝia enhavo mi ne konsentas. Unue, al mi ŝajnas, ke la raporto ne baziĝas sur fakto. Ekz. li skribas "En aŭgusto 1945 eksplodis la unua atombombo super Hiroŝima kie pereis 70.000" Sed laŭ oficiala japana statistiko, publikigita de hiroŝima urb-administranto, mortinoj en Hiroŝima kaŭze de la atomatako nombras pli ol 240.000. Eble la aŭtoro studas nur publikaĵojn de usona armeo, kiu intencas malpliigi la riproĉon de la mondo pri tiu ĉi afero. Mi esperas, ke PACO publiku veran fakton pri atombombo. Due, kaj tio estas grava, li skribas "... sed kontraŭ la atombombo ekzistas ebleco sin ŝirmi ..." Ĉu ĝi estas prava. Kiel k-do. V. Řepka skribis "... ne estas kaŭzo por paniko. La usona atomdiplomatiko kaj atom-sociologio celas timigi la mondon, ni ne bezonas timi Usonon kaj aliajn ŝtatojn, kiuj havas atomarmilojn, ĉar la mondo ne permesos ilian uzadon, sed por realigi tion, la popoloj de la mondo devas persiste batali kontraŭ la posedatoj de atomarmiloj.

K-do d-ro. Řepka skribis "...dum normalaj cirkonstancoj tiutempe, la nombro de viktimoj estus malaltigita almenaŭ je unu dekonon.

Sed kio estas normala? La cirkonstanco, ke tiam ne okazis alarmo, multigis viktimojn. Tio estis vere bedaŭrinda afero, grava fiasko de gardintoj. En la antaŭa nokto aeratako daŭris la tutan nokton kaj matene 3 usonaj aviadiloj venis kaj du el ili forflugis, tial gardisto erare juĝis, ke la atako jam finis kaj anoncis eksigon de alarno. Tiam eksplodis la atombombo kaj tio multigis la viktimojn. Tio estis tempo la japana aer-armeo pereis kaj usona aviadilo preskaŭ ĉiam, restis super Japanio. Tial oni daŭrigis kutiman laboron, se nur unu aŭ du usonaj aviadiloj troviĝis en iu distrikto.

D-ro. V. Řepka skribis: "En 1945 la atomatako kontraŭ ne ŝirmitaj japanaj "ligno-urboj" estis surpriza." Ĉi priskribo estas parte prava, parte ne ĝusta. Sed plej interesa estas, ke li skribas nur pri la bombo de 1945 kaj tute ne mencias, ke la nuna bombo estas miloble pli efika ol la lasta. En 1945 la atombombo kaŭzis grandan domaĝon al lignourbo, sed la nuna povas doni grandan domaĝon al ferbetonaj konstruaĵoj. Usona hidrogenbombo eksplodigita en pacifika insulo, vaporigis la tutan insulon kaj nun post ĝi restis nur profunda maro. Se tia bombo eksplodus (tio ne devas okazi) super Praha, tie restus nur profunda kavo, kelkkilometrojn kaj kelkmetrojn profunda. Ĉu urbano de Praha povus sin ŝirmi kontraŭ tia eksplodo?

Kompreneble tia detruo estas limigita nur en malvasta areo. Eblas eviti domaĝojn, se oni rifuĝas en malproksiman montaron, sed oni ne povas eviti malsaniĝon pro radio-aktiva elemento. En la kuranta jaro denove ankoraŭ ĉ. 10 personoj mortis pro atommalsano. Ili spertis la atombombon en relative malproksima loko, aŭ vizitis la urbon ĝis post la eksplodo. Se la nuna forta hidrogenbombo kovrita per kobalto estos eksplodigita super Praha, la tuta Eŭropo estos plena da radioaktivoj Co^{60} kaj aliaj elementoj kaj dum longa tempo mortados multaj homoj pro atommalsano. Se kelkcentoj da tiaj radio-aktivaj bomboj eksplodos en Usono, kaj Sovjetio, nia ter globo estos kovrita de radioaktivaj elementoj, kaj estas duba, ĉu la homaro povos daŭrigi sian ekziston.

Japana esplorŝipo Ŝunkocu-maru revenis en junio de sia monata vojaĝo en Pacifika Oceano, kie nun usona armeo eksperimentas atom-bombon. Nun la materialoj estas precize esplorataj. Sed estas jam klare, ke radioaktiva akvo disvastiĝas al 2.000 km okcidente de la eksplodejo kaj proksimiĝas al Japanio. La danĝera akvo estus portata de Kuroŝio (Nigra Marfluo). La usona registaro decidis danĝeran sferon, sed la maro ne obeas. La danĝera akvo transpasas la limojn. Tio signifas, ke la danĝero estas pli granda ol usona sciencisto antaŭsupozis.

Same okazis ĉe la eksplodo en Bikini. Radioaktiva cindro mortigis pacan fiŝiston, naĝintan ekster la de usona registaro markigita danĝerlimo. Necesas noti, ke la efektiva danĝero ĉiam estis pli granda ol la antaŭsupozo de sciencistoj.

Unuvorte mi opinias, ke via artikolo baziĝas je la domaĝoj de la atombombo el 1945, dume la nuntempa bombo estas miloble pli forta kaj danĝera. Mi esperas, ke vi nun profunde studu la nunan hidrogenbombon kaj la rezulton bonvolu publikigi en "PACO".

Hukunaga-Isao
Macuzaki, Ogoor-maĉi, Mii-gun,
Hukuoka-ken, Japanio.

INTERŜANĜO DE FILMOJ

La artikolo de k-dino Paraige el Anglio interesis min. Ni jap. MEM-anoj projektas interŝanĝadon de filmetoj por magia lanterno. Jam pli ol 20 filmojn mi ricevis de k-do. Schödl el Germanio. 3 el ili estas multobligitaj en Japanio. Ankaŭ mi sendis pli ol 20 al k-do. Schödl, el kiuj kelkaj estas multobligitaj en Germanio. Tio grave kontribuas al reciproka interkonatiĝo de popoloj. Ni ankaŭ deziras interŝanĝi tiajn filmetojn kun aliaj landoj kaj jam mi preparas Esp-katalogon de disponeblaj filmoj. Ankaŭ ni volonte interŝanĝus kulturaĵojn kun ĉiulandaj gek-doj de kulturdomoj aŭ laborantaj en kulturaj aferoj. Bonvolu kontakti pri tio kun:

K-do. Hukunaga-Isao, Macuzaki,
Ogoor-maĉi, Mii-gun, Hukuoka-ken, Japanio.

GEKAMARADOJ NE FORGESU

ke ni daŭre luktas pro manko de mono! Pagu tuj vian jarabonon!

KORESPONDI DEZIRAS

K-do A. KUBULNIEKS, p.n. Liebkalne, Erglu raj. Liebkalnes 7-g, Skola, Latvia S.S.R., kun geinstruistoj-lingvistoj, precip. el Popoldemokr.

K-do František ZOLD, studento, STREDA n/Bogrodome, okr. Králový Chlumeck, Ĉeĥoslovakio, kun la tuta mondo pri ĉiuj temoj.

K-ado Andreas DOBO, instruisto, BOŤANY, poŝta BIEL, okr. Králový Chlumeck, Ĉeĥoslovakio, pri geografio, naturscienco. Interŝanĝ. il. p.k. kun popolkostumoj, p.m. kaj gramofondiskojn kun ĉ. landoj.

K-do Vladimir Mioduŝevskij, Verhnij Val 54 kv. 58, KIEV, USSR, kun ĉ. land. pri Esp. kaj pacmovado.

K-do Inĝ. Mikaelo VAIL, (50j), Niĵnij Val 19 kv. 7, KIEV, USSR, kun ĉ. landoj pri Esp. kaj paco.

K-do Sterjo Z. KUKUSEV, ĉefagronomo, Maŝin-Traktora Stacio "BELOZEM", PLOVDIV-2, Bulgario, por la rondeto kun agronomoj, maŝinrakt. stacioj kaj agrikult. kooperativoj el ĉ. l.

K-do Zdeněk ANTOŠ, ROKYCANY-III/8, Ĉeĥoslovakio, kun ĉ. landoj koresp. kaj ŝakludi. Certe resp.

K-dino Růža KOČENDOŬÁ, Bílá ĉ. 2, OSTRAVA-III, Ĉeĥoslovakio, kun ĉiuj landoj per la let. kaj il.p.k.

K-do Michal MAŠTALÉŘ, Křižíkova 15, OSTRAVA-I, kun ĉiuj landoj per let. kaj il. p.k.

K-do Metodi DEJANOV, 9. Septembro N-o 104, KJUSTENDIL, Bulgario, dez. ricevi filat. afr. let kaj il.p.k., Esp-gazetoj, kaj mondrevuojn el ĉ.l.

K-do Arsenio V. POPOFF, per Plechanova 24, 24, TOMSK, Siberio, Sov. Unio, suferas altan sangopremon, bezonas medikamenton "SERPACILO-0.10". Alsendo rekompencota laŭdezure.

K-do Endel Gjasild /22j/, Kalevi 13 TARTU, Estonia S.S.R., kun ĉiuj landoj per il.p.k.

K-do Thomas SULLING, Kalevi 13, TARTU, Estonia S.S.R., pri sporto kaj div. temoj. Interŝ. bildkartojn.

K-do Vasili RŬS, ĵurnalisto, Veestr. 23-2, PÄRNO, Estonia S.S.R., k.ĉ.l.

K-do DOBRI Kirov, Stamolijski No 4, GODEĈ, Bulgario, kun ĉ. landoj pri filmo k. literaturo. Interŝ. il.p.k.

K-do Andrej SIDOROV, Ul. Nekrasovo No 12, KRJUKOVO, Raj. Ĥimski, Moskovskaja obl., Sovjet-Unio, nur pri tradukado de esperantigita literaturo en naciajn lingvojn.

K-do Zdeněk RALIŠ, ŽIVANICE ĉ. 60, Okr. Pĕrlouĉ, Ĉeĥoslovakio, k.ĉ.l. pri radiotekniko

kaj aliaj temoj. Interŝanĝas gazetojn ktp.

K-do Otakar OTRUSINA, Braunerova č. 13, OSTRAVA-Hulváky, Ĉeĥoslovakio, kun la tuta mondo. Resp. certe.

K-do Josef BERNADY, Tř. 1. Máje 14, OSTRAVA-III, Ĉeĥosl. kun ĉ. landoj

MUNICIO POR NIA BATALO

K-do J. Kožušník, Ostrava	5,- Kč	K-dino O. Šostáková, Mar. Hory	9,-
K-do J. Majtner, Ostrava	10,-	K-do J. Svoboda, Děčín	4,-
K-do R. Janečka, Lipová	19,-	K-do P. Rosa, Bratislava	9,-
K-do A. On., Ostrava	10,-	K-do M. Plachý, Skoronice	4,-
Esp-rondeto Plzeň	500,-	K-do O. Vašnovský, Ostrava	4,-
K-do J. Toufar, Brno	50,-	K-do V. Tretiak, Jelšava	14,-
K-do B. Preliáš, Šumbark	8,-	K-dino M. Hrubešová, Třebíč	4,-
K-do J. Windisch, Brno	4,-	K-do J. Valeš, Praha	4,-
K-do J. Valkóczy, Budapest	10,-	K-do J. Novosad, Kopřivnice	4,-
Esp.pacdefendantoj, Mikulov	11,-	K-do J. Ballay, Brno	2,-
K-do M. Basl, Tábor	4,-	K-do Vycpálek, Žižkov	4,-
K-do J. Hůda, Jihlava	10,-	K-do J. Solnický, Opava	4,-
K-dino Š. Šumavanská, Praha	4,-	K-do M. Szmigiel, Cheb	4,-
K-do J. Janouš, Ostrava	5,-		

MORTIS D-ro Stanislav KAMARÝT

el Chotěboř ĉe Praha, unu el la plej sindonemaj esp-istoj en ĈSR, iama ĉefredaktoro de nia landa Esp. gaz. Unu el la unuaj kunbatalantoj de la Esp-pacmovado en ĈSR. En ĉiuj kunvenoj niaj gek-doj donis al li la lastan honoron per silenta ekstaro. Li restas por ni neforgesebla.

Pardonu nepublikigon de gravaj raportoj – pro manko de mono – mankas loko.

Eldonis: OKRESNÍ VÝBOR OBRÁNCŮ MÍRU, odbor esperantistů – MIKULOV,
Redaktis: K-do. Rudolf BURDA, Palackého náměstí č. 6, P L Z E Ň ,
Ĉ E Ĥ O S L O V A K I O